Kion ni diras? P.K. kunvenas la 1/8 kaj devus decidi, ĉar la literaro estos 5 semajnoj post mendo.

Provaĵo pri efika propagandado

Cirkulero al la kluboj kaj rektaj membroj

P E R F E K T A P R O P A G A N D O

Ĉiu homo bezonas A L U M E T O J N. Ĉu vi do komprenas kion ni devas fari? Jes, ĝuste vendi alumetojn kun esperanta propagando sur la etikedo.

La preĝo estos la ordinara: 5 oeroj po skatolo kaj ĉar la kvalito estos Tri Steloj, ĉiu volonte aĉetos nian "propagandon".

Por ricevi speciale favoran prezon SEF devas mendi minimume 5 0 0 0 0 tiajn skatolojn kun bela etikedo en du koloroj kaj nia pli ol 1 0 0 0 membroj vendu 1 aŭ 2 pakaĵojn (10 skatoloj) al ĉiuj siaj amikoj, najbaroj, ĉefoj ktp. Sed certe multaj povas vendi ankaŭ grandajn pakaĵojn (100 skatoloj) al hoteloj, restoracioj, kafejoj kaj similaj publikaj ejoj. Krome vi povas peti butikestron ke li ĝuste dum la esperanto semajno helpu vin vendi kelkajn pakaĵojn en sia butiko.

Do, se ĉiuj vere komprenas ke ĉi tio estas la plej genia propagandilo de nia jarcento, ni verŝajne T U J povas ricevi vian mendilon.

Jen la preze:

SEF pagas por:	Vi pagas:	La aĉetanto pagas:
100 skatoloj Kr 2:60	Kr. 4:-	Kr. 5:-

Por ŝpari afrankon ni petas vin mendi minimume 1 grandan pakaĵon (100 skatoloj) La livero okazos ĉirkaŭ la 10-an de septembro kaj tial la mendiloj devas esti ĉe SEF plej malfrue la 1-an de ~~Augusto~~ septembro. La pagon vi suntempe sendu per poŝtĝiro 2 0 1 2.

SEF pagos la pakaĵafrankon kaj tial via gajno estos 10:- po 1000 venditaj skatoloj.

Ek al senza kaj efika laboro por Esperanto.

Sukcesplenan propagandon deziras al vi

S E F

- - - -